


Loko / kiel alveni:

La seminario okazos en la "Maison de la Citoyenneté Nord", kiu situas ĉe "Place du Marché aux Cochons", proksime de la metrostacio "Minimes – Claude Nougaro" de la linio B.



Hortabelo:

| vendredo 5-a | sabato 6-a | dimanĉo 7-a |
|---|--|---|
| <p>19h00 > 22h00 : "Manĝo-Klaĉo", esperantista vespermanĝo (vd. informojn sube)</p> | <p>9h00 > 9h30 : akceptado, te- kafumado 9h30 > 12h30 : teoria parto 12h30 > 14h00 : tagmanĝo en la restoracio "La Milonga" 14h00 > 17h00 : praktika parto 1</p> | <p>8h30 > 9h00 : akceptado, te- kafumado 9h00 > 12h00 : praktika parto 2</p> <hr/> <p>12h00 > 14h00 : irado en la plant-ĝardenon, kaj pikniko 14h00 > 15h00 : vizito de la Natur-sciencia muzeo de Tuluzo (senpage)</p> |

Vendreda manĝa-klaĉo:

"Manĝo-klaĉo" estas la tradicia nomo en Tuluzo de la ĉiunonataj vesper-kunvenoj, dum kiuj ni manĝas kaj babilas en Esperanto. La partoprenantoj kunportas iom da manĝaĵoj, trinkaĵoj, kaj bona humoro. Ja manĝo-klaĉo okazos en la "Maison de Quartier Ranguel", 19 strato Claude Forbin, proksime de la metro-stacio "Ranguel" (linio B). Se vi deziras partopreni, bv. anonci vin telefonante Marion (06.87.64.75.84).

Sabata tagmanĝo:

Dek lokoj estas rezervitaj en la argentina restoracio "La Milonga", kiu troviĝas 5 minutojn piede de la seminariejo. Vi povos elekti el du menuoj (13€ aŭ 16€). Se vi preferas ne manĝi tie bv. informi min, ke mi malrezervu vian lokon.

Festo de l' Kvartalo:

La tutan semajno-finon okazos la Festo de l' Kvartalo Minimes, sur la placo antaŭ la Domo de l' Civitaneco. Estas programitaj diversaj koncertoj kaj staros sur la placo trink- kaj manĝo-budoj.

Post la seminario:

La 7an de Junio estos la unua dimanĉo de la monato: ni do proponas profiti la senpagecon de la muzeoj por viziti la belan Natur-Sciencan Muzeon de Tuluzo (normale la enirbileto kostas 9€). Antaŭe, ni piknikos en la apuda plant-ĝardeno (okaze de malbona vetero, estos alternativo manĝi en krespejo de la urbo-centro). La viziton de la Natur-Sciencia Muzeo gvidos amiko de nia asocio... en Esperanto kompreneble!

Okaze de problemo: **06.31.80.40.07** aŭ **06.87.64.75.84**